Atentu: pli preciza projekto por la fondo de Instituto Teo Jung estas preparata kaj estos prezentanta en Heroldo de Esperanto kaj sendata por diskuto al ĝiaj naturaj membroj, nome la individuaj abonantoj de Heroldo de Esperanto.

---------

# Pri klopodo solvi la konflikton inter Lexus kaj LF-koop kaj pri fondo de Instituto Teo Jung.

## Oficiala Komuniko - dua versio

Sociala Grupo Lexus, la eldonejo de Heroldo de Esperanto, tre bedaŭras, ke sia konflikto kun LF-koop rilate la gazeton Heroldo de Esperanto ne estis solvita ĝis nun per avantaĝa interkonsento inter la du flankoj.
LF-koop argumentas pri nia nesolventeco kaj ni argumentas pri neplenumo de la klaŭzo rilate liveron de aktualaj abonantoj (jarkolekto 2016). Do ambaŭ flankoj ne respektis la kontrakton.
Celante solvi ĉi tiun konflikton ni faris proponon al LF-koop rilate la financajn klaŭzojn kaj la klaŭzon pri la livero de listo kun la aktualaj abonantoj. LF-Koop diskutos nian proponon en sia ĝenerala asembleo en la 15 de oktobro, sed ĉar tiu propono ne estis klare prezentita en HeKo-komuniko (http://esperantio.net/index.php?id=3329) , ni prezentas ĝin sube, tute klare kun ĉiuj proponitaj punktoj:

1. Sociala Grupo Lexus pretas rezigni pri la listo de abonantoj;
2. Kompense, la 10 partopagoj ankoraŭ ne pagitaj fariĝos 20 (tio estas, anstataŭ pagi monate x eŭrojn, Lexus devos pagi x/2 eŭrojn pro la duobligo de la pagperiodo) kaj la unuan partopagon Lexus pagos en la 27-a de decembro;
3. Restos la klaŭzo pri repreno de Lexus kaze de malfruo de tri sinsekvaj monataj partopagoj;
4. Se Lexus monate pagos anticipe kroman partopagon, LF-kook donos rabaton je 40% sur tiu kroma pago, kaj 50%-rabaton ekde la dua anticipa pago en la sama monato. Alivorte, okaze de akurata pago, sed sen kromaj pagoj en la sama monato, Lexus bezonos 20 monatojn ekde decembro por fariĝi kvita. Se estos en la plej pozitiva perspektivo 3 pagoj ĉiumonate, Lexus ĝuos rabaton sur 2 partopagoj (40% kaj 50% respektive por la unua kaj dua kromaj pagoj,

sed ne sur la ordinara antaŭvidita pago) kaj bezonos nur 6,66 monatojn por pagi ĉion, parte rebatite;

5. KCE, kiu pagis por kolektiva abono de Heroldo al LF-koop, kiu siavide retenis la pagon kiel parto de la tuta vendoprezo de Heroldo, ricevos la ekzemplerojn kolektive abonitajn (entute por 24 numeroj).

Tio estas tre honesta kaj deca propono, ĉar ĝi sendevigas la vendinton de Heroldo pri la listo de aktualaj abonantoj kaj iomete kompensos nin pro tiuj rabatoj koncernaj al la anticipaj pagoj, dum aliaj klaŭzoj restos netuŝitaj.

Ni esperas, ke nia propono estu serioze traktita de LF-koop. Se LF-koop ĝin akceptos, Heroldo de Esperanto estos estonte proprieto nek de LF-koop, nek de Sociala Grupo Lexus, sed de la tutmonda HdE-abonantaro, kiu konsistigos la membraron de Instituto Teo Jung.

## Instituto Teo Jung

Flanke de Sociala Grupo Lexus, Heroldo estas de nun ligita al nova plano adaptita el nia originala plano, kies kulmino estos donaco de Heroldo de Esperanto al ĝiaj individuaj abonantoj, unuiĝontaj en nova internacia asocio fondota en Brazilo, nome **Instituto Teo Jung** (neregistara organizaĵo - NRO - do sen profitaj celoj), kiu funkcios kiel pensoganizo kaj kies membraro konsistos el esperantistoj el la tuta mondo individue abonantaj Heroldon. Tiu donaco okazos kompreneble nur post fina elpago de nia ŝuldo al LF-koop, do temos 100% pri donaco de Sociala Grupo Lexus. La nova asocio havos la jenajn celojn:

1- eldoni kaj subteni Heroldon de Esperanto **kiel sendependan gazeton**;
2- eventuale eldoni fakajn periodaĵojn en Esperanton, laŭ ĝia financa situacio tion ebligos;
3- roli kiel novaĵagentejo celanta liveri al la neesperantista gazetaro novaĵojn kaj artikolojn pri lingvoj, Esperanto kaj aliajn temojn ligitajn la la lingva termaro (lingva diskriminacio, lingvaj rajtoj ktp). Tiu novajâgentejo funkcios unue en la portugala lingvo, poste en la angla, hispana, rusa, germana, franca, itala japana, ĉina kaj aliaj lingvoj. Do, Instituto Teo Jung rolos kiel profesia Esperanta novaĵagentejo;
4- Organizado/sponsorado de specifaj iniciatoj kaj evento por diskonigi kaj Esperanton kaj Heroldon en la ĵurnalisma medio (fakultatoj pri kaj ĵurnalismaj asocioj kaj entreprenoj).

Kvankam tiu donaco al la abonantoj de Heroldo povos konkretiĝi nur post la plena elpago de la ŝuldo de Lexus al LF-koop, tamen espereble Instituto Teo Jung estos fondita jam en julio 2018, okaze de la UK en Lisbono. Komisiono formita de ĉiuj aktualaj individuaj abonantoj kaj dumvivaj abonantoj (dunvivuloj laŭ listo liverita de

LF-koop), kiuj petos aliĝon al tiu ĉi fond-komisiono, kaj unu reprezentanto de Lexus kaj unu de LF-koop, kreos la statuton de la nova organizo kaj ĝin diskutigos por posta rapida formala aprobo okaze de la ĝenerala asembleo. La sidejo de Instituto Teo Jung estos en Brazilo (do, granparte la statuto devos konformi al la brazila leĝo). La celoj ĉi-supre prezentitaj estas nur deirpunkto kaj la fond-komisiono devos decidi pri la definitivaj celoj kaj la abonantaro de Heroldo ilin anticipe aprobos (post diskutado) ĝis la okazigo de la lisbona ĝenerala asembleo.

Tute certe Instituto Teo Jung certigos al Heroldo de Esperanto longan vivon, kaj multe kontribuos por ĝia evoluo kiel sendependa gazeto kaj por profesinivela gazetara servo, en pluraj naciaj lingvoj. Neniu neos, ke tiu solvo estas bona por ĉiuj (LF-koop ricevos sian monon!), ĉar Heroldo de Esperanto, kiel posedaĵo de la abonantoj, unuiĝintaj en organizaĵo sen profitaj celoj kun kelkaj aliaj celoj krom subteno de HdE-eldonado sed iel ligitaj al ĵurnalismo, honoros la fondinton de Heroldo de Esperanto, nome Teo Jung, kaj estos granda paŝo por grandioza jubileo en 2020 (100-jariĝo de Heroldo)
Krom la elpago de la ŝuldo, estos aliaj kondiĉoj, defende al la bonfarto de Instituto Teo:
1- Heroldo devos fariĝi daŭripova gazeto, kun suficê granda nombro da abonantoj.
2- Objektive, rilate la antaŭan punkton, la enpezo el la abonoj devas estis sufiĉe por subteni profesian skipon kun kvar redakciaj stabanoj (redakcia direktoro, direktoro, redakcia sekretario kaj ĉefprovleganto) kaj almenaŭ unu administra oficisto.
3- Fabrício Valle, la donanconton, testamentos al Instituto Teo Jung por garantii, ke okaze de sia morto, Heroldo ne fariĝu orfo. Krome, estos redaktita direktivoj, kun la partopreno de Instituto Teo Jung, por ke Heroldo de Esperanto restu por ĉiam senpendenpa gazeto kaj ne fariĝu gazeto regata de unu unu aŭ malmultaj homoj.
Sendepende de la tempo necesa por atingo de ĉiuj kondiĉoj, Instituton Teo Jung oni nepre fondu jam okaze de la UK en Lisbono, por ke ĝia membraro komencu aktive partopreni de la vivo de Heroldo, cele al preparo por ĝin ricevi donance siatempe.
Al tio mi, kiel nun nura posedanto de Sociala Grupo Lexus kaj de Heroldo de Esperanto volas kontribui. Espereble ankaŭ LF-koop pretos same kontribui por tiu granda novaĵo en Esperantujo.

Trindado (Brazilo), la 17-an de oktobro 2017 (dua versio de la oficiala komuniko)

Fabrício Valle